XXVIII ORDINARA DIMANĈO -11an de oktobro 2009

VENDU KION VI HAVAS KAJ SEKVU MIN – Komentario al la Evangelio de p. Alberto Maggi. O.S.M.
Mk 10, 17-30

[En tiu tempo], dum li foriris sur la vojo, unu homo kuris al li kaj genuis antaŭ li, kaj demandis lin: Bona Majstro, kion mi faru, por ke mi heredu eternan vivon? Kaj Jesuo diris al li: Kial vi nomas min bona? neniu estas bona krom Unu, nome Dio. Vi scias la ordonojn: Ne mortigu; Ne adultu; Ne ŝtelu; Ne parolu malveran ateston; Ne rabu; Respektu vian patron kaj vian patrinon.

Kaj li responde diris al li: Majstro, ĉion tion mi observis detempe de mia juneco. Kaj Jesuo, rigardante lin, amis lin, kaj diris al li: Unu mankon vi havas; iru, kaj vendu ĉion, kion vi havas, kaj donu al malriĉuloj, kaj vi havos trezoron en la ĉielo; kaj venu, sekvu min. Sed li malgajiĝis ĉe tiu vorto, kaj foriris malĝoja; ĉar li havis multajn posedaĵojn.

Kaj Jesuo ĉirkaŭrigardis, kaj diris al siaj disĉiploj: Kiel malfacile tiuj, kiuj havas riĉon, eniros en la regnon de Dio! Kaj la disĉiploj miris pro liaj vortoj. Sed Jesuo, respondante denove, diris al ili: Infanoj, kiel malfacile estas por tiuj, kiuj fidas al la riĉo, eniri en la regnon de Dio! Estas pli facile por kamelo iri tra trueton de kudrilo, ol por riĉulo eniri en la regnon de Dio. Kaj ili forte miregis, dirante al li: Kiu do povas esti savita? Rigardante ilin, Jesuo diris: Ĉe homoj tio estas neebla, sed ne ĉe Dio; ĉar ĉio estas ebla ĉe Dio.

Petro ekparolis al li: Jen ni ĉion forlasis kaj vin sekvis. Jesuo diris: Vere mi diras al vi: Ekzistas neniu, kiu forlasis domon aŭ fratojn aŭ fratinojn aŭ patrinon aŭ patron aŭ infanojn aŭ kampojn pro mi kaj pro la evangelio, kaj kiu ne ricevos centoble en ĉi tiu tempo, domojn kaj fratojn kaj fratinojn kaj patrinojn kaj infanojn kaj kampojn, kun persekutado; kaj en la venonta mondo eternan vivon.

En la Evangelio laŭ Sankta Marko, ĉiufoje kiam la evangeliisto mem uzas la terminon “vojo” (ὁδός) tio indikas ĉiam la senfruktan semadon. Estas la semo kiu estas ĵetita, sed venas la birdojn.

Tiuj estas bildoj kiuj poste Jesuo komentis kiel se la Diablo mem prenus la jesuan mesaĝon. La Diablo estas la bildigo de la povo, de la riĉo, de ĉio kio malhelpas la akcepton de la mesaĝo de Jesuo. La evangelia peco kiun ni komentos hodiaŭ komencas ĝuste per “dum li foriris sur la vojo”. Do la Evangeliisto jam diras al ni ke la semado estos senfrukta..

“Estas unu homo”, la evangeliisto ne diras al ni kiu li estas, “kiu kuris al li kaj genuis antaŭ li”. En tiu Evangelio estas du la rolantoj kiuj havas tiujn karakterizojn: unu kiu kuras renkonten al Jesuo, tiu estas la Geraseno kiu havas malpuran spiriton (Mk.5,5), tio estas la homo kiu estas sklava je io pli forta ol si mem, li estas prizonulo, kaj la ununura homo kiu genuiĝas antaŭ Jesuo estas la leprulo (Mk. 1, 40) kiu estis konsiderita kiel ulo flankenmetita de Dio.

Do, la evangeliisto celas diri al ni ke tiu rolanto estas enprizonigita de io pli forta ol si mem kaj ke li kelkmaniere estas ekskludita de Dio. Nu, tiu angorplena ulo sin turnas al Jesuo demandante al Jesuo kion li devas fari por havi la eternan vivon.

Kaj Jesuo en Sia respondo lin resendas al Dio kaj Li ne elnombras ĉiujn la dek ordonojn – la ordonoj estis disdividitaj en du partoj, la unua parto rilatis la neprajn devojn rilate al Dio kaj tiu parto estis absolute nur por Izraelo, la alia parto rilatis la sintenon kaj la devojn rilate la homojn kaj tiu ĉi parto estis komuna al ĉiuj tiutempaj kulturoj.

Nu Jesuo forigas la unuan parton, do, por havi la eternan vivon ne gravas la rilato kiun oni havis al Dio, sed gravas nur la devoj rilate la aliuloj. Kaj el la dua parto li nombras nur kvin ordonojn plus unu regulo. ”Ne mortigu; Ne adultu; Ne ŝtelu; Ne parolu malveran ateston” - paroli malveran ateston ne signifas mensogi, sed signifis la malveran ateston kiu sendis la akuziton ĝis la mortopuno, do, la malveran ateston kiu poste kaŭzas la morton de la akuzito, kiel okazis por Jesuo – kaj tie la evangeliisto enŝovas “ne trompoŝtelu, ne rabu”. Tiu estis regulo eltirita de la Libro de Readmono, kiu direktiĝis al labordonantoj, ne trompoŝtelu vian dungiton, sed en la posttagmezo mem donu al li sian salajron.

Do, la evangeliisto aludas ke en tiu ulo kiu alproksimiĝas al Jesuo enestas tiun problemon. Kaj “Respektu vian patron kaj vian patrinon” – respekti signifas ilin ekonomie vivteni, estis malhonoriga afero lasi la gepatrojn en malriĉego. Tiu ulo plenigas sian buŝon pro ĝojo ĉar li ĉion tion observis detempe de sia juneco.

Li diras: “Majstro ĉion tion” – la greka lingvo vidigas al ni ke li plenigas ĝuste sian buŝon, tiu ulo diras **ταϋτα πάυτα** *(tàuta pànta),* ni vere sentas esprimon kiu plenigas la buŝon – “ĉion tion mi observis detempe de mia juneco”. Tiam Jesuo “fiksrigardis lin” – rigardi fikse individuon **(έμβλέπω)** signifas penetri en sia vera realo – la rigardo de Jesuo estas ĉiam turnita al komuniko de vivo, de amo – kaj Li diris al li... Jesuo ne diras, kiel foje komprenas la tradukistoj, “ununura afero mankas al vi” kvazaŭ temus pri eta ĉerizo sur kukon, vi estas tiel bona, vidu, nur faru alian paŝon, Jesuo diras:” Unu mankon vi havas”.

En ilia kulturo kiam mankis “unu”, tiam ĉio mankis; nu Jesuo diras al li: “vi nenion havas”.

Kial “vi nenion havas? Ĉar ni vidos en tiu rakonto ke la ulo estis riĉa. Kaj fakte Jesuo diras: ”iru, kaj vendu ĉion, kion vi havas, kaj donu al malriĉuloj, kaj vi havos trezoron en la ĉielo, nome Dio estos vian certecon.

Li iris al Jesuo por havi pli multe, kaj, kontraŭe, Jesuo invitas lin doni plie

“Kaj poste venu, sekvu min. Sed li malgajiĝis ĉe tiu vorto, kaj foriris malĝoja; ĉar li havis multajn posedaĵojn”. Jen kial la evangeliisto prezentis al ni tiun ulon kuranta kiel tiu kiu havas malpuran spiriton. Li estas tute subigita de la riĉo. Li opiniis ke li havas riĉaĵojn, fakte li estas subigita al ili.

El la Evangelioj oni komprenas ke oni posedas nur tion kion oni donacas, kion oni retenas por si mem, oni tion ne posedas, sed ĝi nin subigas. Tiu homo opiniis havi riĉaĵojn, vere li estis posedita de ili. Kaj do ne estis bone por li renkontiĝi kun Jesuo; li renkontis Jesuon dum li estis angorplena kaj foriras de Li tute malĝoja.

Nun ni vidos la reagon de la disĉiploj al la radikalismo de Jesuo. Ili restas konfuzitaj el la fakto ke Jesuo submetas je kondiĉo forlasi ĉiujn siajn riĉaĵojn la riĉulon por ke li povu eniri en la Regno de Dio, nome en la kristana komunumo.

Tiam Jesuo, vidinte tiun reagon, sin turnas al siaj disĉiploj kaj konfirmas – por la riĉuloj, kompreneble, - " Kiel malfacile tiuj, kiuj havas riĉon, eniros en la regnon de Dio!", Ĉar la disĉiploj pro la fakto ke ili akceptis Jesuon kaj Lian mesaĝon jam estas en la Regno de Dio. Do, Jesuo ne estas indikinta kiel estas malfacile, kutime, sed kiel tio estas malfacila afero por la riĉuloj. Kial?

En la Regno de Dio ekzistas loko por la sinjoroj, sed ne por la riĉuloj. La sinjoro estas tiu kiu donas, dum la riĉulo estas tiu kiu havas aĵojn kaj ilin retenas por si mem. Kaj do Jesuo donas la popolan ekzemplon pri la kamelo kaj pri la trueto de kudrilo por indiki la maleblon por la riĉulo, ĉar la komunumo de Jesuo estas la loko de la malavareco.

Nu, antaŭ la readfermo de Jesuo, al Sia radikalismo estas la konfuzon de la disĉiploj kiuj eĉ pli konfuzitaj diris inter si: "Kaj kiu do povas esti savita?**".** Tie ĉi oni ne celas priparoli la eternan savon, ĉar ni jam vidis ke eĉ la riĉulo se li sintenas honeste, saĝe, sufiĉas ke li observu la dek ordonojn, kaj eĉ ne ĉiuj; ne gravas la observadon de la devoj rilatantaj al Dio, sed gravas la observadon de tiuj rilatantaj la proksimulo, tiukaze, ankaŭ li havos la eternan vivon.

Ĉi tie la savo ne koncernas la eternan vivon, la greka verbo tradukita per "savi" (**σώζω)** signifas elteni , eviti danĝeron".

Nome, la rezonado de la disĉiploj estas la jena.: se al riĉulo, kiu povis eniri nian grupon vi metas kiel kondiĉon ke li liberiĝu el ĉiuj siaj avaĵoj, kiel ni povos antaŭeniri, kiel ni povos nin vivteni? Estas tiu la problemo levita de la disĉiploj.

"Sed Jesuo, rigardante ilin, diris: Ĉe homoj tio estas neebla, sed ne ĉe Dio!". La homoj opinias ke la feliĉo konsistus en la havo de ĉiam pli da riĉo. Jesuo kiu estas Dio instruas ke la feliĉo, la vivo estas donaci ne havi ion. Ju pli oni donacas des pli oni akiras la kapablon, flanke de Dio, doni al la homoj.

Kaj ĉi tie estas la reago de unu el la disĉiploj, kiu estas prezentata per la negativa kromnomo. Simono, kromnomita Petro, do kiam estas nur la negativa kromnomo, tio indikas ke li oposicias Jesuon. Fakte li refutas: "Jen, ni ĉion forlasis" – kiu, kiel ni vidos poste, eĉ ne estas vero – "kaj ni sekvis vin".

Estas problemo: Petro sekvas Jesuon, almenaŭ li tion opinias, sed li ne Lin akompanas, nome li ne alpropriiĝis la idealojn de Jesuo. Nu, jen la respondo de Jesuo "Vere" – do tiu estas solena aserto kiu transiras la respondon al Petro, sed ĝi koncernas la komunumon de la kredantoj el ĉiu tempo – "Ekzistas neniu, kiu forlasis domon", kaj poste estas kontraŭmeto, "aŭ fratojn, aŭ fratinojn, aŭ patrinon, aŭ patron, aŭ infanojn, aŭ kampojn", ne estas konjuncio kaj..., kaj..., kaj...

Jesuo por ke oni Lin sekvu ne petas ĉion forlasi, sed Li petas forlasi nur kion malhelpas la plenan liberon de la homo. Se temas pri la domo – domo signifas familiaj riĉaĵoj -, se temas pri fratoj, aŭ pri fratinoj, aŭ pri la patro aŭ la patrino... do ekzistas unu el tiuj malhelpoj, forlasu ĝin, ĝin abandonu, ĉar ĝi malhelpas al vi ĝuj la plenon de la vivo.

Tiu forlaso oni devas fari pro Jesuo kaj pro la Evangelio, estas tiu la problemo de Simono. Simono sekvas Jesuon sed li ankoraŭ ne komprenis la Bonan Novaĵon [La Evangelio] de Jesuo, tiun universalan amon kiun oni devas disdoni al ĉiuj homoj.

Nu, Jesuo certigas "kiu ne ricevos centoble en ĉi tiu tempo" – centoble indikas benon flanke de Dio, kaj dum oni forlasas tie aŭ la domon, aŭ la fratojn aŭ la fratinojn, la beno estas ĉionkosidera,

“centoble” - “domojn” – kaj tie estas konjuncio – “kaj fratojn kaj fratinojn kaj patrinojn kaj filojn kaj kampojn”.

Ekzistas tie malapero, inter la forlasendaj malhelpoj estis la patro, sed la patron nun oni ne retrovas inter la benoj. La patro indikas la aŭtoritaton, tiun kiu estras, li estas forlasita kaj oni lin ne retrovas en la kristana komunumo, ekzistas neniu patro en la komunumo krom la ĉiela Patro. Kaj la ĉiela Patro ne regas la homojn publikiginte leĝojn kiujn ili devas obej, sed Li regas komunikante profunde al ili Sian Spiriton.

Kune kun Ĝi estas persekutoj, sed, aldonas Jesuo “estas la eterna vivo”. Nome, la persekutoj kiuj povas alveni ne malhelpas la plenon de la vivo, tiu kiu estas eterna.